

33 HISTORIO DE KAPELESTRO KALINA

„Tia ekimozo aŭ kontuzo, diris sinjoro Dobeš, „doloras iam pli ol frakturo; sed ĝi devas esti sur ostoj. Mi scias tion, mi estas malnova futbalisto kaj jam mi havis rompitaĵojn, klaviklon kaj polekson; nun oni ne ludas kun tia ardo, kiel dum mia junaĝo. Sed pasintjare ankoraŭ unufoje mi ludis; ni maljunaj sinjoroj, ni volis montri al la nuntempaj junuloj, kian taktikon ni havis. Denove mi estis halfo, kiel antaŭ dek kvin aŭ dudek jaroj; kaj ĝuste, kiam mi estis kaptanta pilkon per ventro, piedbatis min mia propra golejestro al - hm, ĝi estas nomata kokcigo aŭ cauda equina. En tiu rapidego nur momenton mi insultis kaj poste tion forgesis; sed ĝuste nokte ĝi komencis dolori kaj matene tute mi ne povis moviĝi. Ĝi estis tia doloro, ke mi povis movi nek la manojn, nek la piedojn - estas strange, kiel en la homo ĉio koneksas. Mi kuŝis do surdorse kiel morta skarabo, nek sur kokson mi povis kuŝiĝi, nek per halukso skueti; mi siblis nur kaj ĝemegis; tiom terure ĝi doloris.

En tia stato mi trakuŝis la tutan tagon kaj ankoraŭ unu nokton; dormi mi povis eĉ ne dum unu sekundo. Estas strange, kiel la tempo malrapide pasas, kiam oni ne povas moviĝi; ĝi devas esti ege turmenta, kiam iu estas superŝutita. Mi kalkulis kaj potencigis, mi preĝis, ankaŭ iujn poemojn mi rememoris, nur por ke la tempo pasu al mi, sed senĉese estis nokto.

Subite, povis esti ĉirkaŭ la dua matene, mi aŭdis, kiel iu plenforte sube kuras sur la strato; kaj post tiu iu kuregis la tuta aro kaj estis aŭdeblaj proksimume ses voĉoj: ci ricevos, mi senintestigos cin, ci fibubo, ci bastardo kaj similaj aferoj. Ĝuste proksimume sub miaj fenestroj ili kaptis lin kaj nun ĝi komenciĝis, ia piedŝovado de proksimume ses piedparoj, plaŭdado sur vango, lignosonaj batoj, same kiam oni batas la kapon per bastono, spiregado, plorpepado, sed nenia krio.

33 HISTORIE DIRIGENTA KALINY

“Taková krevní podlitina nebo obraženina,” řekl pan Dobeš, „někdy bolí víc než zlomenina; ale to musí být na kosti. Já to znám, já jsem starý fotbalista a měl už jsem zlomené žebro, klíční kost a palec; teď už se nehraje s takovým zápalem jako za mých časů. Tak loni jsem si ještě jednou zahrál; my staří páni jsme chtěli ukázat těm dnešním mládencům, jakou jsme mívali taktiku. Já byl zase bekem, jako před patnácti nebo dvaceti lety; a zrovna když jsem chytal břichem míč, kopl mne můj vlastní brankář do - hm, ono se tomu říká kostrč čili cauda equina. V tom kalupu jsem jenom chvilku nadával a pak jsem na to zapomněl; ale teprve v noci to začalo bolet a ráno jsem se vůbec nemohl hnout. To vám byla taková bolest, že jsem nemohl ani pohnout rukou, ani kechnout, - to je zvláštní, jak v tomhle lidském těle všechno souvisí. Tak jsem ležel na zádech jako mrtvý brouk, ani na bok jsem se nemohl přeložit, ani palcem u nohy zatřepat, nic; jenom jsem sykal a hekal, jak to děsně bolelo.

V tomhle stavu jsem proležel celý den a ještě jednu noc; spát jsem nemohl ani vteřinu. To máte divné, jak je ten čas dlouhý, když se člověk nemůže pohnout; to musí být například moc trapné, když je někdo zasypan. Já jsem počítal a umocňoval, modlil jsem se, ba i na nějaké básně jsem si vzpomněl, aby mně ten čas utekl, ale ona pořád byla noc.

Najednou, to mohlo být ke druhé hodině ráno, jsem slyšel, jak někdo ze všech sil utíká dole po ulici; a za tím někým se hnál celý hlouček a bylo slyšet asi šest hlasů: ty dostaneš, já tě vykuchám, ty kluku mizerná, pancharte a takové ty věci. Zrovna asi pod mými okny ho chytli a teď vám to začalo, takové to šoupání nějakých šesti párů nohou, pleskání po hubě, ty dřevěné rány, jako když se tluče holí o hlavě, supění, kňučení, ale žádný křik.

Aŭdu, tio ne povas esti, ses uloj kontraŭ unu homo kaj bategi lin kiel sakon; mi volis leviĝi kaj diri al ili, ke tio ne decas, sed mi ekkriegis pro doloro; mildiabloj, mi ne povis min movi! Tia senpovo estas terura; mi dentgrincis kaj blekis pro furiozo kiel besto. Kaj subite io en mi krakis, mi saltis el la lito, ekkaptis bastonon kaj kuregas desur ŝtuparo malsupren.

Kiam mi elkuris en la straton, mi estis tute blinda; mi karambolis kun iu ulo kaj komencis lin bategi per la bastono; la ceteraj ĉiuflanken diskuris, sed en mia vivo ankoraŭ neniam mi iun tiel batregalis kiel tiun ulaĉon. Nur poste mi konsciiĝis, ke dume torente fluis miaj larmoj pro la doloro; poste daŭris la tutan horon antaŭ ol mi revenis tra la ŝtuparo en la liton, sed matene jam mi kapablis paŝi; tio estis vere miraklo. Nur mi ŝatus scii," aldonis sinjoro Dobeš enpense, "kiun tiam mi tiel bategis; ĉu tiu estis iu el la supernombro, aŭ tiu, kiun bategis la aliaj. Sed unu kontraŭ unu, tio almenaŭ estas honesta."

„La senpovo estas terura," diris kapelestro kaj komponisto Kalina, kapskuante. „Iam, sinjoroj, mi travivis tian okazaĵon, tio estis en Liverpolo; oni invitis min tien, por ke mi direktu al ili iun koncerton kun ilia orkestro. Sciu, mi scias angle eĉ ne unu vorton; sed ni muzikantoj scias interkompreniĝi sen longaj paroloj, precipe, kiam ni havas enmane taktilon; tiam oni frapsignalas, ion krias, okulumas kaj gestas kaj poste oni komencas denove. Tiamaniere oni povas esprimi eĉ la plej delikatajn sentojn; kiam ekzemple mi faras kun la manoj tiel, ĉiu ekkonas ja, ke ĝi signifas mistikan suprenleviĝon kaj savon el la pezo kaj doloro de l' vivo.

Kiam mi alveturis en Liverpolon, atendis min angloj en la stacidomo kaj forveturigis en hotelon, por ke mi ripozu; sed baninte min, sola mi iris rigardi la urbon, kaj dume mi perdiĝis. Kiam mi estas ie, unue mi iras rigardi al rivero; ĉe rivero oni ekkonas, por esprimi min, orkestradon de la urbo.

Poslouchejte, to prece nejde, ŝest chlapů na jednoho člověka a řezat do něho jako do pytle; já jsem chtěl vstát a říci jim, že se to nepatří, ale zařval jsem bolestí; krucinál, já jsem sebou nemohl pohnout! Taková bezmoc je strašná; já jsem skřípal zuby a mečel vztekem jako zvíře. A najednou vám to ve mně ruplo, já jsem vyskočil z postele, popadnu hůl a letím po schodech dolů.

Když jsem vyrazil na ulici, já byl úplně slepý; narazil jsem na jednoho chlapa a začal jsem vám do něho řezat holi; ti ostatní se rozběhli na všechny strany, ale tak jsem ještě nikomu v životě nenamlátil jako tomu mamlasovi. Teprve potom jsem si uvědomil, že mně přitom čůrkem tekly slzy bolesti; pak mně to trvalo hodinu, než jsem se dostal po schodech zase do postele, ale ráno jsem už chodil; to vám byl přímo zázrak. Jen bych rád věděl," dodával pan Dobeš zamyšleně, „do koho jsem to tehdy tak mlátil: jestli to byl někdo z té přesily, nebo ten, do kterého řezali ti druzí. Ale jeden proti jednomu, to je aspoň fěr."

„Bezmoc je strašná," pravil dirigent a skladatel Kalina kývaje hlavou. „To jsem, páni, jednou zažil takovou příhodu, to bylo v Liverpoolu; mne tam pozvali, abych jim dirigoval nějaký koncert s jejich orchestrem. Víte, já neumím ani slovo anglicky; ale my muzikanti se dorozumíme bez dlouhých řečí, zvláště když máme v ruce taktovku; to člověk odklepe, něco křičí, kroutí očima a ukazuje rukama, a pak zase začne znova. Tím způsobem se dají vyjádřit i nejjemnější city; když například udělám takhle rukama, tak to prece každý pozná, že to znamená mystický vzlet a vykoupení z takové té tíhy a bolesti života.

Když jsem tedy přijel do Liverpoolu, čekali mě ti Angličani na nádraží a odvezli mě do hotelu, abych si odpočal; ale když jsem se vykoupal, tak jsem se šel sám podívat na město, a přitom jsem se ztratil. Když já někde jsem, tak se jdu nejdřív podívat k řece; u řeky člověk pozná, abych tak řekl, orchestraci toho města.

Sur unu flanko vi havas bruegon de la urbo, tamburojn, timbalojn, trumpetojn, kornetojn kaj metalajn muzikilojn kaj sur la dua flanko la rivero, tio estas kordoj, la pianisimo de violonoj kaj harpoj; tie oni aŭdas samtempe la tutan urbon.

Sed en Liverpolo estas rivero, mi ne scias, kiel oni ĝin nomas, sed ĝi estas flava kaj terura; kaj la rivero muĝas kaj brusonas, kriegas, blekas kaj tintegas, bruegas kaj trumpetas pro ŝipoj, remorkoj, transportŝipoj, magazenoj, dokoj kaj arganoj; sciu, treege mi amas ŝipojn, ĝi estu aŭ ia ventroforma kaj nigra trenŝipo aŭ ruĝe lakita varŝipo, aŭ la blankaj transmaraj vaporŝipoj. Kaj mi diris al mi, jen ie post angulo devas ja esti oceano, tien mi devas iri rigardi; kaj mi ekkuris laŭlonge de la rivero malsupren.

Mi kuris du horojn, senĉese preter nuraj magazenoj kaj remizoj kaj dokoj; nur ie tie oni povis vidi ŝipon altan kiel katedralon aŭ tri dikajn kaj oblikvajn kamentubojn; fetoris tie fiŝaĵo, ĉevalŝvito, juto, rumo, tritiko, karbo, fero - aŭskultu, kiam estas granda amaso da fero, ĝi havas tute distingeblan ferodoron. Mi estis kvazaŭ en ekstazo; sed poste jam estiĝis nokto, kaj mi venis al ia sablejo, kontraŭe lumis lumturo kaj dise naĝis ia lumeto -, eble ĝi estis oceano; mi eksidis sur fostan amason kaj sentis min tiel bele soleca kaj perdita, mi aŭskultis, kiel ĝi plaŭdas kaj vaste muĝas, kaj mi hurlus pro nostalgio.

Poste venis tien du homoj, viro kun virino, sed ili ne vidis min; ili sidis dorse al mi kaj mallaŭte parolis -, se mi komprenus angle, mi ektusus, por ke ili sciu, ke iu aŭdas ilin; sed ĉar mi sciis eĉ ne unu anglan vorton krom hotelo kaj ŝilingo, mi restis silenta.

Komence ili parolis ege stakate; poste la vira voĉo komencis lante kaj mallaŭte ion rakonti, kvazaŭ ĝi ne volus el li eksteriĝi; kaj poste rapide li tion vortŝutis. Tiu virino ekkriis pro teruro kaj ion ekscitite ŝi diris al li; sed li kunpremis ŝian manon, ŝi ekveis, kaj li komencis ŝin duonvoĉe persvadi.

Po jedne straně máte celou tu vřavu ulic, ty bubny a tympány, trubky, horny a plechy, a na druhé straně řeka, to jsou struny, takové to pianissimo housliček a harf; tam člověk slyší celé město najednou.

Ale v Liverpoolu je vám řeka, já nevím, jak se jmenuje, ale je taková žlutá a strašná; a ta řeka vám hučí a duní, řve, bučí a řinčí, rachotí a troubí samými loděmi, remorkéry, pakeboty, sklady, loděnicemi a jeřáby; víte, já mám nesmírně rád lodi, ať je to takový bachratý a černý vlečnák, nebo červeně natřená nákladní loď, nebo ty bílé zámořské parníky. Tak jsem si řekl, propána, tady někde za rohem musí být oceán, to se tam musím podívat; a rozběhl jsem se podle řeky dolů.

Já běžel dvě hodiny, pořád podle samých skladišť a kůlen a doků; jen místy bylo vidět loď vysokou jako chrám nebo tři tlusté a šikmé komíny; smrdělo to rybinou, z pocenými koni, jutou, rumem, pšenicí, uhlím, železem – poslouchejte, když je velká hromada železa, tak má docela zřetelnou železnou vůni. Já byl jako u vidění; ale pak už spadla noc, a já jsem přišel k takové písčíně, naproti svítil maják a sem tam plulo nějaké světélko, – snad to byl oceán; tam jsem si sedl na hromadu fošen a cítil jsem se tak krásně osamělý a ztracen, poslouchal jsem, jak to šplouchá a široce šumí, a byl bych vyl steskem.

Pak tam přišli dva lidé, mužský se ženskou, ale neviděli mne; seděli zády ke mně a tiše hovořili, – kdybych byl rozuměl anglicky, byl bych zakašlal, aby věděli, že je někdo slyší; ale protože jsem neznal ani jedno anglické slovo kromě hotel a šilink, zůstal jsem zticha.

Nejdřív hovořili hodně staccato; potom začal ten mužský pomalu a tiše něco vykládat, jako by to z něho nechtělo ven; a pak to rychle vysypal. Ta ženská vykřikla hrůzou a něco mu rozčileně říkala; ale on jí sevřel ruku, až zaúpěla, a začal jí mezi zuby domlouvat.

Aŭskultu, tio ne estis ama interparolo, tion muzikisto ekkonas; ama persvado havas tute alian kadencan kaj ne sonas tiel enfermite -, ama interparolo estas profunda violonĉelo, sed ĉi tio estis alta basviolono ludata preste rubate en unu pozicio, kvazaŭ tiu homo senĉese ripetus la saman aferon.

Min ĝi komencis iom teruri; tiu homo diris ion malbonan. La virino komencis mallaŭte plori kaj kelkfoje ŝi ekkriis kvazaŭ rezistante, kvazaŭ ŝi volus lin deteni; ŝi havis iom klarnetan, lignecan voĉon, kiu ne sonis tro junece; sed la vira voĉo parolis ĉiam pli sible, kvazaŭ ĝi ordonus ion aŭ minacus. La virina voĉo komencis malespere peti kaj haltadis pro teruro, same kiel parolhaltas homo, kiam oni donas al li glacian kompreson; kaj estis aŭdeble, kiel ŝi dentklakas.

Tiam la vira voĉo komencis murmuri tre profunde, nete base kaj preskaŭ ame, la virina ploro transiris al eta kaj pasiva plorsingulto; tio signifas, ke la rezisto estis rompita. Sed poste la ama baso denove altiĝis kaj paŭzante, pripenseme, nerezisteble metis frazon post frazo; la virina voĉo dume nur iom senpove lamentis aŭ eksingultis; sed tio jam ne estis rezisto, nur freneza timo, ne timo antaŭ la viro, sed vizia hororo antaŭ io futura.

Kaj tiam la vira voĉo denove malaltiĝis al kvietiga zumado kaj mallaŭtaj minacoj; la virina plorego ŝanĝiĝis je stultigitaj kaj senpovaj ĝemoj; kaj la viro prezentis malvarmflustre kelkajn demandojn, kiujn versimile sekvis kapjeso; ĉar plu li ne insistis. Poste tiuj du ekstaris kaj ĉiu foriris en alian direkton.

Aŭskultu, mi ne kredas antaŭsentojn, sed mi kredas la muzikon; kiam tie tiunokte mi aŭskultis, mi sciis tute certe, ke la basviolono persvadas la klarneton al io terura. Mi sciis, ke la klarneto revenas hejmen kun subjugita volo kaj faros, kion la basviolono al ĝi ordonas. Mi aŭdis tion, kaj aŭdi estas pli multe ol kompreni la vortojn. Mi sciis, ke estas preparata ia krimo; kaj mi sciis, kia.

Poslouchajte, to nebyl milostný hovor, to muzikant pozná; milostné přemlouvání má docela jinou kadenci a nezní tak jaksi sevřeně, – milostný hovor je hluboké cello, ale tohle byla vysoká basa, hraná takovým presto rubato, v jediné poloze, jako kdyby ten člověk pořád opakoval jednu věc.

Mne to počalo trochu děsit; ten člověk říkal něco zlého. Ta ženská začala tiše plakat a několikrát vykřikla jako odporem, jako by ho chtěla zadržet; měla trochu klarinetový, dřevěný hlas, který nezněl tuze mladě; ale ten mužský hlas mluvil pořád sykavěji, jako by něco poroučel nebo vyhrožoval. Ženský hlas začal zoufale prosit a zajíkal se hrůzou, jako se zajíká člověk, když mu dáte ledový obkladek; a bylo slyšet, jak jí drkotají zuby.

Tu ten mužský hlas se jal bručet velmi hluboko, čistě basově a skoro zamilovaně; ženský pláč přešel do drobného a pasívniho vzlyku; to znamená, že byl odpor zlomen. Ale pak se zamilovaný bas zase zvýšil a přerývaně, rozváženě, neodmluvně kladl větu za větou; ženský hlas do toho jen tak bezmocně zakvílel nebo zavzlykl, ale už to nebyl odpor, jenom šílený strach, ne strach z toho mužského, ale vyjevená, vizionární hrůza z něčeho budoucího.

A tu ten mužský hlas zase poklesl do chlácholivého bzučení a tichých vyhrůžek; ženské štkání se změnilo ve zpitomělé a bezbranné vzdechy; a muž položil studeným šeptem několik otázek, na které patrně dostal kývnutí hlavy; neboť už nenaléhal. Pak ti dva vstali a každý odešel jiným směrem.

Poslouchajte, já nevěřím v předtuchy, ale věřím v muziku; když jsem tam v té noci poslouchal, já jsem věděl naprosto jistě, že ta basa přemlouvá ten klarinet k něčemu strašlivému. Věděl jsem, že ten klarinet se vrací domů s ujařmenou vůlí a udělá, co mu ta basa nařizuje. Já jsem to slyšel, a slyšet je víc než rozumět slovům. Já jsem věděl, že se chystá nějaký zločin; a já jsem věděl jaký.

Tion mi ekkonis laŭ la teruro, kiu blovis el la du voĉoj; ĝi estis en koloro de la voĉoj, en kadenco, takto, intervaloj, cezuroj - aŭdu, la muziko estas ekzakta; pli ekzakta ol la parolo. Tiu klarneto estis tro simpla por povi mem ion fari; ĝi nur helpos, transdonos ian ŝlosilon aŭ malfermos pordon; sed la kruda kaj profunda basviolono tion faros, dum la klarneto haltados pro hororo.

Mi kuregis al la urbo kun scio, ke io devas okazi, ke mi devas ion fari por malhelpi tion; ĝi estas terura sento, ke oni venos malfrue.

Fine ĉe angulo mi vidas policiston kaj kuras al li, ŝvitplena kaj senspira. Sinjoro, mi hastvortigis, ĉi tie en la urbo oni preparas ian murdon! La policisto ŝultrolevis kaj ion diris, kion mi ne komprenis. Diomia, mi rememoris, li ne komprenas ja al mi eĉ unu vorton! Murdo, mi kriis al li, kvazaŭ li estus surda - ĉu vi komprenas? Ian solecan sinjorinon ili volas mortigi! Tiu servistino aŭ mastrino helpos dume -, sakre, mi ekkriegis, faru ion, homo!

La policisto nur kapskuis kaj diris ion kiel 'jurvej'. Sinjoro, mi rakontis al li indigne, kaj dume mi tremis pro kolerego kaj hororo, la povra virino malfermos al sia amato, venenon vi povas veti! Vi ne rajtas tion lasi! Serĉu ŝin! Dume mi rememoris, ke mi tute ne scias, kiel tiu virino aspektas; sed se mi sciis tion, ankaŭ mi ne povus tion diri. Jesuo Kristo, mi ekkriis, ĝi estas ja nehoma lasi tion!

La angla policisto atente rigardis min kaj iel min kvietigis. Mi ekkaptis mian kapon. Ci stultulo, mi kriis pro malespero senkonscia, mi mem tion trovos, kie ĝi estas! Mi scias, ĝi estis frenezaĵo, sed rigardu, oni devas ion fari, se ies vivo estas riskata; dum la tuta nokto mi kuris tra Liverpolo, por eble vidi, ĉu iu volas ŝteleniri iun domon. Ĝi estas stranga urbo, tiel terure morta nokte ...

Antaŭ mateniĝo mi sidiĝis sur rando de trotuaro kaj ploraĉis pro laco; tie trovis min policisto, diris al mi 'jurvej' kaj alkondukis min en mian hotelon.

Já jsem to poznal podle té hrůzy, která čišela z těch dvou hlasů; bylo to v barvě těch hlasů, v kadenci, tempu, intervalech, césurách, – poslyšte, hudba je přesná, přesnější nežli řeč. Ten klarinet byl příliš jednoduchý, než aby mohl sám něco provést; bude jen pomáhat, vydá nějaký klíč nebo otevře dveře; ale ten hrubý a hluboký bas to vykoná, zatímco klarinet se bude zajíkat úděsem.

Já jsem uháněl k městu s tím vědomím, že se musí něco stát, že něco musím udělat, abych tomu zabránil; to je takový děsný pocit, že člověk přijde pozdě.

Konečně vidím na rohu policajta a běžím k němu, zpocený a bez dechu. Pane, vyhrkl jsem, tady ve městě se chystá nějaká vražda! Strážník pokrčil rameny a něco mně říkal, čemu jsem nerozuměl. Proboha, vzpomněl jsem si, vždyť on mně slovo nerozumí! Vražda, křičel jsem na něho, jako by byl hluchý, – rozumíte? Nějakou osamělou paní chtějí zabít! Ta služka nebo hospodyně přitom bude pomáhat, – hergot, zařval jsem, tak dělejte něco, člověče!

Ten strážník jen potřásl hlavou a řekl jenom cosi jako ‚jurvej‘. Pane, vykládal jsem mu roztrpčeně, a přitom jsem se třásl vztekem a hrůzou, ta ubohá ženská tomu svému milenci otevře, nato můžete vzít jed! To nesmíte tak nechat! Hleďte ji! – Přitom jsem si vzpomněl, že ani nevím, jak ta ženská vypadá; ale kdybych to věděl, nemohl bych to stejně říci. Ježíšikriste, vykřikl jsem, vždyť je to nelidské to tak nechat!

Ten anglický strážník se na mne pozorně díval a jaksi mě chlácholil. Já jsem se chytil za hlavu. Ty pitomče, křikl jsem bez sebe zoufalstvím, tak já najdu sám, kde to je! Já vím, ono to bylo bláznovství, ale koukejte se, člověk něco musí dělat, když jde někomu o život; já jsem vám běhal celou noc po Liverpoolu, kdybych snad viděl, jak se někdo chce vloudit do nějakého domu. To vám je divné město, tak strašně mrtvé v noci...

K ránu jsem si sedl na kraj chodníku a brečel jsem únavou; tam mě našel strážník, řekl mně ‚jurvej‘ a dovedl mne do mého hotelu.

Mi ne scias, kiel tiun matenon mi kapelestris la provkoncerton; kiam je la fino mi terenĵetis la taktilon kaj elkuris surstraten, kamelotoj kriofervis vesperĵurnalojn.

Mi aĉetis ekzempleron -, estis tie granda surskribo MURDER kaj sub ĝi foto de ia blankhara sinjorino. Mi opinias, ke murder signifas murdon."

Já nevím, jak jsem toho rána na zkoušce dirigoval; ale když jsem nakonec praštil taktovkou o zem a vyběhl na ulici, vykřikovali tam kameloti večerníky.

Koupil jsem si jeden, – byl tam veliký nápis MURDER a pod ním fotografie nějaké bělovlasé paní. Já myslím, že murder znamená vražda."